Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org/
julio - aŭgusto 2011, n-ro 7 -8 ( 1273 - 1274 ) Prezo 7€

# Sennaciulo

## Nia dosiero -
## Kia SAT en nia moderna mondo?

1921

ESPERANTO
S.A.T.

2011

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO!**



# SAT – 90 jarojn amikeco, 90 jarojn klerigado. SAT daŭre vigla kaj viva!

Redaktantoj - Kreŝo Barkoviĉ, Robin Beto, Tonyo Del Barrio, Jomo Ipfelkofer, David Kelso, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale. ĉefredakto Jakvo.
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de S.A.T..
Tekstojn vi sendu al: Sennaciulo@telenet.be - aŭ al Jakvo Schram Hof ter Bekestraat 49. BE-2018 Antwerpen

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel. Le directeur de la Publication: Jacques Bannier; Abonnement annuel/jara abono France 55 €. Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567

## Sennaciulo

## Oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1 47 97 71 90
Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s

Plenum-Komitato de SAT :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Vinko Markovo
Kasistino : Franjo Leveque-Provost
Membroj: Guy Cavalier, Gérard Lieblang, Arturo Prent,Thérèse Sabatier

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Ĉu SAT denove kreskos? | 4 |
| Ĉu SAT denove kreskos? (reago) | 5 |
| Ĉu estonte platformo? | 6 |
| SAT 90-jara! | 7 |
| SAT, kian estonton? | 10 |
| Kia SAT en la 21-a jarcento? | 11 |
| Diplomatoj kunsidas... la borso gvidas | 12 |
| Mense nigraj ŝafoj | 13 |
| Rebataĵoj | 13 |
| La krizo en Hispanio | 14 |
| Historieto pri migrado | 16 |
| Monda stato de la atomnuklea armado en 2011 | 18 |
| Raporto de la revizoroj | 18 |
| temo: kiel politiko neglektas la sentojn . | 19 |
| Emanuel "Manny" Fried (1913–2011): | 21 |
| Heroo de la Laborista Klaso | 21 |
| Nokte kiam mi dormadis | 23 |
| Via nomo | 24 |

# Kia SAT en nia moderna mondo?

## ĈU SAT DENOVE KRESKOS?

Post legado de la diskutoj "Ĉu SAT estas ligita al maldekstraj partioj?"[1], "Pri klasbatalo"[2] kaj "Ĉu SAT estas komunisttendenca asocio?"[3] – iniciatitaj respektive de Gerardo Lieblang, Jakvo Schram kaj mi mem en SAT-rondo de Ipernity – kaj diskutpropono de Ĝemilo Kessous titolita "Ĉu SAT kapablas denove kreski?", indus pritrakti la demandon, kiun ofte faras personoj interesiĝantaj pri Sennacieca Asocio Tutmonda: "Ĉu SAT estas komunisttendenca asocio?" Tio evidente estas prijuĝo erara.

Se oni legas la statuton de SAT oni trovas ekzemple la esprimojn kiel "... por la klasaj celoj de la laboristaro..." aŭ "... la diversaj klasbatalaj partioj kaj sindikatmovadoj ...". La vorto klasbatalo devenas de Marx kaj la Komunista Manifesto (kvankam ne nur komunistoj uzas ĝin). Gerardo difinas tion, kion oni komprenu per la vorto laboristo, kaj donas al ĝi signifon tre larĝan, kaj Jakvo konstatas ke klasbatalo ekzistas, kvankam la tiel nomataj klasbatalaj partioj kaj sindikatmovadoj nuntempe perdis multe de sia iama signifo kompare kun la tempo (1922) kiam la statuto de SAT estis adoptita.



Okazas regule diskutoj, ĉu oni ŝanĝu ĉi tiun vorton klasbatalo en la statuto. Iuj indiferentas pri tiu esprimo, dum kelkaj komunistoj deklaras ke ili forlasus la asocion se oni ekzemple parolus pri "batalo por sociala justeco" aŭ io simila kaj ne pri "klasbatalo". La plimulto en SAT estas tolerema kaj... konservema, kaj ne volas ŝanĝi ion ajn en la statuto. Kompreneble statuto estas necesa por la funkciado de asocio, sed aliflanke ĝi tutcerte ne estas la sola kaŭzo de la stagnado de SAT. Similaj asocioj same stagnas kaj la maldekstro entute malfortiĝis kaj penas trovi adekvatajn respondojn al nuntempaj problemoj en la tutmondigita socio. La sento de solidareco interne de la salajrula klaso malfortiĝis kaj la ĝenerala tendenco evoluis al individuismo. Oni ankaŭ devas konsideri ke la socio en la 21-a jarcento komplikiĝis kaj la vivkondiĉoj de laboristoj povas esti ege malsamaj laŭ tutmonda komparo.

Se oni observas la politikan vivon, oni konstatas ke komunistaj partioj perdis multe de sia antaŭa influo post la disfalo de Sovetio (ekzemple en Francio). En multaj landoj ili eĉ ne plu nomiĝas komunistaj partioj, sed alprenis aliajn nomojn (ekzemple en Italio). Ĉu SAT ne devus ankaŭ konsideri tion? Certe ĝi devus daŭre havi maldekstran vidpunkton tre kritikan rilate la ekonomian liberalismon kaj la kapitalisman tutmondiĝon, sed eble tamen iom adaptitan al la nuntempo.

Mi konsentas kun Gerardo Lieblang, kiam li diras, ke oni devus kompari la programojn kaj statutojn de la diverslandaj maldekstraj partioj kaj sindikatmovadoj, kiuj havas similajn celojn kiel SAT. Poste oni verŝajne vidos ke la vorto klasbatalo ne plu aperas en granda parto de tiuj movadoj. Ekzemple la socialdemokratoj en Germanio forlasis tiun marksisman esprimon jam en la 1950-aj jaroj.

En 1922, kiam la statuto de SAT estis fiksita, ĝi estis ia kompromiso inter la tiamaj tendencoj de anarkiistoj, komunistoj kaj socialdemokratoj, tamen kun "avantaĝo" al la sovetiaj kamaradoj tiam havantaj internacian prestiĝon en la laboristaro pro la rusa revolucio kaj la ekesto de la "reale ekzistanta socialismo". Intertempe okazis la dua mondmilito kaj la implodo de Sovetio. Se oni parolas pri klasbatalo, niaj kontraŭuloj ŝatas fiksi nin je la periodo de la socialismaj ŝtatoj en Orienteŭropo antaŭ 1989 aŭ al nuntempa reĝimo en Norda Koreio. Tio evidente estas eraro, sed ĉu ni ne devus adapti nian lingvaĵon al la nuntempo cele al pli ĝusta percepto de eksteruloj kaj eventualaj simpatiantoj? Des pli ke nia asocio ne estas politika, sed kultura.


Malkonstruo de Berlina muro

**Rikardo Schneller 31227**

[1] http://www.ipernity.com/group/asocio.sennacieca/discuss/15293

[2] http://www.ipernity.com/group/asocio.sennacieca/discuss/15321

[3] http://www.ipernity.com/group/asocio.sennacieca/discuss/15341